

La Eŭropa Komunumo demokrate disvolviĝas

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 619-97-2, 1982 septembro 16 kaj 18

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-97/SRI-1982-97-2-619-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-Europa-Komunumo-demokrate-disvolvighas.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia

La Eŭropa Komunumo, kies membroŝtato ne estas Svislando, tutcerte multe kontribuis al la malstreĉiĝo de la rilatoj inter la okcident-eŭropaj landoj. Jam tri elsendojn ni dediĉis al tiu Komunumo, kiu estas fakte malbone konata. Unue ni raportis pri la formiĝo de la Komunumo kaj pri ĝia rapida kresko. De ses membroŝtatoj en 1951, kreskis al 10 membroŝtatoj en 1981. Ni poste vidis, ke la celoj estis sufiĉe progresemaĵoj kaj la strukturoj sufiĉe flekseblaj por ke propra interna dinamismo naskiĝu. Kaj ni konstatis, ke kreiĝis originalaj institucioj, kiuj ne obeas al la tradicia divido de la popoloj inter decidpova, plenuma kaj justica instancoj. Posedas parton de tiuj tri popoloj la Komisiono de la Eŭropa Komunumo, sed ĉiam en kunlaboro kun aliaj instancoj: por la leĝfarado kun la Konsilio de la Ministroj kaj Ambasadoroj, por la kontroloj kaj plendoj kun la Eŭropa Kortumo. Kaj ni vidis, ke la Eŭropa Parlamento ankaŭ havas la kapablon influi la evoluon de la institucioj de la Eŭropa Komunumo. Hodiaŭ ni ekzameni kiel funkcias kaj laboras la Eŭropa Kortumo.

A.- La origino de la Kortumo kuŝas en la fakto, ke en la traktato de la Eŭropa Komunumo por Karbo kaj ŝtalo oni antaŭvidis la eblecon de disputoj inter la instancoj de la Komunumo kaj la karbo- kaj ŝtalo-entreprenoj. Por solvi tiujn ĉi disputojn oni kreis specialan tribunalon.

Cl.- Post la enkonduko de la Komuna Merkato en 1958 la Komisiono de la Komunumo, kiu estas, kiel ni vidis, la motoro de la Komunumo, ricevis la rajton procesi kontraŭ membroŝtatoj, kiuj malobeas al la traktatoj, kaj ankaŭ la membroŝtatoj rajtis procesi kontraŭ la decidoj de la Komisiono, se ili opiniis, ke ili estas kontraŭleĝaj.

A.- Tial la Kortumo ludas rolon similan al tiu de la plej altaj juĝinstancoj de la Membroŝtatoj, decidante en disputoj, sed ankaŭ interpretante la traktatojn kaj la aliajn regulojn bazitajn sur ili.

Cl.- La Eŭropa Kortumo kapablas konservi la pacon en la sino de la Komunumo, ĉar la membroŝtatoj cedis parton de sia suvereneco. Paco ne povas regi inter plene suverenaj ŝtatoj. Ekzemple paco ne povas regi interne de la Unuiĝinta Naciaro, ĉar la membroŝtatoj apartenantaj al la Naciaro ne promesis submeti siajn konfliktojn al decidpova jurisdikcia instanco, al Monda Tribunallo. Ili konservis la rajton mem juĝi pri la propra konduto.

A.- En julio 1975 estis kreita speciala tribunallo, la Kortumo pri Revizio, tio pere de nova kaj aparta traktato. Tiu ĉi Kortumo pri Revizio ekzamenas la kontojn de la instancoj de la Eŭropa Komunumo, por kontroli, ĉu ili bone korespondas al la buĝetitaj elspezoj. Tiu Kortumo eĉ ricevis la rajton enketi pri elspezoj faritaj de la Membroŝtatoj ekzemple koncerne la agrikulturan politikon, kiu estas Komunuma. Je la fino de ĉiu jaro la Kortumo pri Revizio eldonas raporton, kiu presiĝas en la Oficiala Gazeto de la Komunumo. Ĝia sidejo estas en Luksemburgo.

Cl.- Por ebligi kiel eble plej multe da opini-interŝanĝoj kaj favori demokratian disvolviĝon de la Eŭropa Komunumo, oni kreis en 1958 la Ekonomian kaj Socian Komitaton. Tiu ĉi Komitato grupigas reprezentantojn de laboradantoj, dungantoj, industriistoj, bankestroj, ktp, de laboristoj, ĉefe sindikatestroj, kaj de aliaj profesiaj interesoj, farmistoj, liberaj profesioj, konsumantoj, ktp. Entute la Ekonomia kaj Socia Komitato konsistas el 156 membroj.

Francio, Britio, Germanio kaj Italio havas en ĝi po 24 reprezentantojn, Belgio, Nederlando kaj Grekio po 12, Irlando kaj Danlando po 9 kaj Luksemburgio 6.

A.- Luksemburgio havas proporcie pli grandan reprezentadon ol la grandaj ŝtatoj. Tio estas konstanta regulo en la federaciaj reĝimoj, ke la etaj ŝtatoj estas plivalorigitaj per troigo de sia reprezentado en la diversaj inatancoj.

Cl.- La tasko de la Ekonomia kaj Socia Komitato estas doni opiniojn pri la leĝproponoj, kiujn la Komisiono de la Komunumo prezentas al la Konsilio de la Ministroj.

A.- En certaj kazoj tiu agmaniero estas deviga, en aliaj ĝi estas fakultativa. La Ekonomia kaj Socia Komitato ankaŭ rajtas je propra iniciativo prepari opinion aŭ studon pri iu ajn grava Komunuma temo. Ĝi sendas tiujn opiniojn al la Konsilio kaj al la Komisiono de la Komunumo, kaj la Komisiono povas, sed ne devas, ŝanĝi sian leĝproponon laŭ la opinio ricevita.

Cl.- Iom post iom aliaj institucioj kreiĝis. Ni menciuj la Eŭropan Investobankon kaj diversajn Centrojn. En Dublino unu tia Centro okupiĝas pri la medio, en Berlino pri la instruado profesia. Esplorcentroj kreiĝis en Ispra (Italio) kaj Karlsruhe (Germanio) kaj nuntempe kreiĝas aliloke.

A.- Neniu organismo funkcias sen mono. La buĝeto de la Komunumo establiĝas en artefarita monunujo, kiu ekzistas nur en kontoj. Ĝi nomiĝas "ekuo": monbiletoj aŭ moneroj en tiu monunujo ne haveblas. La valoro de la ekuo dependas de la ekonomia grandeco de la diversaj Membroŝtatoj kaj de la reciproka valoro de ties valutoj. Oni nomas tion la monkoktelo aŭ monkorbo.

Cl.- Por 1981 la buĝeto de la Eŭropa Komunumo atingis 19 milionojn 300 mil ekuojn. Estas sufiĉe modesta sumo, se oni konsideras, ke ĝi reprezentas eĉ ne unu procenton de la brutta enlanda produkto de la Komunumo aŭ ekvivalentas nur al 2,5 %-oj de la buĝeto de la membroŝtatoj. Kun multe malpli da mono la Eŭropa Komunumo faras multon pli por la paco, ol la defend-ministerioj de la membroŝtatoj.

A.- Jam ekde la komenco de la Eŭropa Komunumo evidentiĝis, ke unuiĝo de ekonomioj kaj monoj estus la plej granda paŝo, kiu povus fortikigi la Komunumon mem kaj akceli la unuiĝon inter la popoloj de Eŭropo. Ĝis nun oni ne atingis la monunuiĝon.

Cl.- Krom la forigo de tarifaj kaj netarifaj malhelpiloj al varointerŝanĝo, oni klopodis proksimigi la valoron de la diversaj landaj valutoj kaj teni ilin je relative fiksj kurzoj. Tio estis la tiel nomata "serpento", kiu mortis post la disfalo de la dolar-bazita monsisistemo en la sepdekaj jaroj. Sed en 1979 komenciĝis nova provo, la Eŭropa Mon-Sistemo. Tiu ĉi sistemo enkondukis la Ekuon. Estas deziro plivastigi la uzon de la eku-monsistemo, ke sur ĝia bazo Eŭropo akiru foje unuecan monon.

A.- La venontan semajnon, en lasta elsendo dediĉita al la Eŭropa Komunumo, ni provos raporti pri ĝia politiko koncerne agrikulturon, fiŝkaptadon, industrion, energion, sciencon kaj teknologion, transporton, ktp.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Sviza Radio Internacia. Claude Gacond kaj Andrée Gacond ĉerpis siajn dirojn el raporto pri la Eŭropa Komunumo, kiun publikigis Kultura Centro Esperantista. Ĝis reaŭdo!